

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2010:3

## Dramo pri la kreinto de Esperanto

En Sveda Esperanto-kongreso en Lesjöfors, sabate vespere la pola aktoro Georgo Handzlik prezentis la teatraĵon "Ludoviko-Lazaro". Ĝi estis unuakta dramo pri la kreinto de Esperanto, kiu daŭris unu kaj duonan horon.

La teatraĵo temis pri la vivo de Zamenhof ekde liaj knabaj jaroj ĝis la morto. Oni povis sekvi la ekeston de la ideo pri internacia lingvo kaj la evoluon de la lingvo mem.

La Espero havis la eblecon starigi kelkajn demandojn al Georgo Handzlik.

- Kiam vi unuafoje ludis tiun ĉi spektaklon?
- En Bjalistoko dum la kongreso.
- Kiom ofte vi ludis ĝin?

La monodramon mi ludis dekdufoje. Mi ludas ĝin proksimume unufoje monate. La sekvonta spektakto estos en Sankt Peterburgo.



*Supre: Georgo Handzlik en la rolo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto.*

*Sube: Patroprenantoj de Anemona renkontiĝo.*

*Fotis: Olof Pettersson*



## Femtioalet esperantister i Lesjöfors

13-16 maj samlades ett femtiotal esperantister i Lesjöfors. Svenska Esperantokongressen och ungdomarnas vitsippeträff ägde rum samtidigt.

## Kvindeko da esperantistoj en Lesjöfors

13-16 Majo kolektiĝis kvindeko da esperantistoj en Lesjöfors. Samtempe okazis Sveda Esperanto-kongreso kaj la junulara anemona renkontiĝo.

## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Junio 2010 • 98-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2010: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2010:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,

754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: esperanto@globalnet.net

*Stoppdatum Utkommer senast*

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5-6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

### Dan Palm



*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Sundbyberg.

*Kie vi loĝas?*

En Helsingburgo.

*Pri kio vi laboras?*

Mi kontrolas akvomezurilojn. Mi laboras en mezurillaboratorio en komunuma kompanio.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Mi amas... aŭ ŝatas lingvojn. Mi ŝatas neordinarajn aferojn. Mi legas librojn. Mi ŝatas historion kaj religiojn, kvankam ne kredanto.

Mi interesiĝas ankaŭ pri politiko.

*Ĉu vi havas familion?*

Mi estas sola. Mi tamen havas patron kaj patrinon k.t.p.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

Mi antaŭ dek kvin jaroj vidis ke oni reklamas pri la lingvo en Helsingburgo. kaj mi aliĝis. En la komenco mi pensis ke ĝi estas moĝoza (slango por popularega) kaj sekreta lingvo.

*Ĉu vi havas aŭ havis iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Nun mi estas anstataŭanto en la estraro de SEF kaj membro-registraro de la organizaĵo kaj kasisto de Rondo Langlet. Ankaŭ kasisto de la klubo en Helsingburgo.

*Ĉu vi havas iun favoritan libron?*

Eble Orm la ruĝa. Mi legis la libron ankaŭ en la sveda.

*Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?*

Mi estas membro de Ateista Esperanta Tutmonda Organizaĵo kaj de Sveda Esperantista Laborista Asocio.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

## VORTOJ DE LA REDAKTORO

Mi partoprenis kelkajn agrablajn Esperanto-renkontiĝojn.

Post kelkjara forestado de Uppsala mi partoprenis la jar-kunvenon de Esperanto-Societo de Uppsala. Estis agrable vidi ke estas multaj novaj membroj en la klubo. Samtempe mi ŝatus revidi ankaŭ la malnovajn.

Dum vojaĝo en Usono mi vizitis Minnesota Esperanto-Asocio. Tiu klubo kunvenas ĉiun duan vendredan vesperon en librovendeja kafejo kun aliaj homoj ĉirkaŭe. Ses homoj sidis babilante dum du horoj. Agrable. Subite alvenis viro en la

aĝo tridek kun du infanoj. Li alparolis nin kaj demandis pri Esperanto, ĉar li ne rekonis la lingvon, kiun lingvon, kiun ni parolis. Fine li kaŝobservis iun vortaron, kiu kuŝis sur nia tablo kaj konstatis ke estas Esperanto. Li foriris kun informfolio.

Trie mi partoprenis la Svedan Esperanto-Kongreson. Pri ĝi mi raportas en alia loko en tiu ĉi revuo.

Mi deziras al vi ĉiuj agrablan someron kaj esperas ke vi kaptos la ŝancon renkonti esperantistojn.

Via redaktoro

# Kvindeko parolis Esperanton dum semajnfino en Lesjöfors

*13-16 Majo kolektiĝis kvindeko da esperantistoj en Lesjöfors. Samtempe okazis Sveda Esperanto-kongreso kaj la junulara anemona renkontiĝo.*



*En la jarkunveno. Fotis: Olof Pettersson.*

## Diskuto pri organizo

Sveda Esperanto-Instituto kunvenis vendrede vespere. Oni diskutis proponon pri reorganizo de la instituto. Ĉu la instituto fariĝu fondaĵo? Ĉu ni povas plisimpligi la organizon de la sveda Esperantomovado. Oni prokrastis la diskuton ĝis la aŭtuno.

Eldona Societo Esperanto jarkunvenis sabate matene. Oni konstatis ke la eldonejo havis gajnon, pozitivan ekonomian rezulton en 2009, ĉefe dank' al kelkaj grandaj mendoj.

Gvidis la jarkunvenon de Sveda Esperanto-Federacio Martin Strid. La unua demando estis ĉu la jarkunveno okazu en Esperanto aŭ en la sveda. Oni decidis ke ĉiuj rajtos paroli aŭ en Esperanto aŭ en la sveda. Oni aŭskultis la jarraporton. Pozitive estis ke multaj homoj kandidatigis por la estraro, tiel ke oni devis voĉdoni inter ili.

Oni proponis ke la jarkongreso en 2011 okazu en Stokholmo.

Jarkunvenis ankaŭ Sveda Esperantista Junulara Organizo (eĉ dumnokte) kaj la instruista ILEI. Estrarkunvenis Esperanto-Gastejo.

## Unu lingvo, malsamaj kulturoj

La invitita gastino Kristin Tutgat el Belgio prelegis pri "Unu lingvo, malsamaj kulturoj". La prelego kaŭzis multajn ridojn. Kristin Tutgat instruas interkulturan komunikadon. Interpretistoj devas ne nur scii la lingvon de aliaj nacioj. Ili devas scii ankaŭ kiel oni komunikas kaj pensas en la alia lando. La aŭskultanto ne ĉiam komprenas tion, kion diras la diranto. En la angla lingvo, ekzemple, ekzistas multaj esprimoj, kiujn neangloj preskaŭ ĉiam miskomprenas. Gestoj estas malsamaj en malsamaj landoj. Montri supren per dikfingro en kelkaj landoj signifas "en ordo". En aliaj landoj ĝi havas tute aliajn signifojn.

Ekzemplo pri kulturaj diferencoj inter germanoj kaj ĉinoj estas ekzemple ke germanoj kiuj volas plendi tuj diras kion ili pensas; ĉinoj unue parolas pri rilataj aferoj kaj malfrue diras sian opinion. Germanoj opinias ke aranĝo devas komenci ekzakte je la difinita tempo; ĉinoj opinias ke ĝi komenciĝu proksimume. Germanoj formas rektan vicon; ĉinoj vicas en grupo. Tio ĉi estas simpligoj, sed estas grave konscii pri ili. Por rusoj estas nature disputadi aŭ eĉ kverelekti eĉ dum festeno; belgoj male absolute volas eviti tro malmolajn interparolojn en amika etoso.

Kristin Tutgat ankaŭ prelegis pri la "Strasburgaj ekzamenoj", t.e. Nova Eŭropa Referenc-kadro, kio estas sistemo por fari samspecajn kaj kompareblajn nivelojn por tuta Eŭropo. La Espero plurfoje pli frue raportis pri tiuj ekzamenoj. La partoprenantoj havis ankaŭ eblecojn partopreni provekzamenon.

## Kaj cetere

Cetere ni ĝuis kunestadon. Vendrede okazis ekskurso, pri kiu bedaŭrinde mankas raporto.

Dimanĉe okazis diservo ĉe la kapelo de la Lesjöfors-muzeo. Partoprenis dudeko da homoj, pro kiu la kapelo mem estis tro malgranda.

Leif Nordenstorm



## Kion vi opiniis pri la kongreso:

Anne-Marie kaj Mille Millianovicz, Åtorp opiniis ke oni bone preparis la kongreson: "Ni tamen multe helpis en la kuirejo, kaj malmulte partoprenis la programon. Ni aŭskultis la teatraĵon. Georgo havas bonan lingvon. Oni parolu malrapide, laŭte kaj inteligente. Tiel Georgo faris."

Soile Lingman, Stokholmo: "La kongreso estis bona kaj interesa. Estis pli da partoprenantoj ol kutime, 51. Venis homoj el ĉiuj partoj de la lando, eĉ pluraj skanianoj. Estis agrable renkonti la junajn homojn. Ili partoprenis en kelkaj programpunktoj. Estas bone ke oni organizos grandan kunvenon ĉi-aŭtune, kie ni diskutos la organizon estontan."

Siri Bartusch, Västerås: Mi ĝojas ke partoprenis tiom da junaj esperantistoj. Estis interese aŭdi la prelegon pri kulturaj diferencoj, kiun faris Kristin Tutgat. Plaĉis al mi ankaŭ la spektaklo.



## Anemona renkontiĝo

Dek kvin ĝis dudek gejunuloj renkontiĝis por Anemona renkontiĝo en Lesjöfors samtempe kun Sveda Esperanto-Kongreso. Ni ludis kartoludon kaj iun ludon kun figuroj. Ni kantis, ludis gitaron kuiris nian propran manĝon. Ni ankaŭ manĝis kune. Ni renkontis multajn novajn homojn. Ni iom ekzercis Esperanton, sed ni ofte forgesas paroli Esperante. Ni tre ŝatas la renkontiĝon. Jam la unua vespero estis tre agrabla. Ĉiuj partoprenantoj estis ĝentilaj kaj sociemaj homoj. Ili interesiĝas pri la aliaj. Ili havas komunan intereson kaj provas paroli Esperanton.

Kun la prenreskuloj ni iom parolis. La teatraĵo ni eble spektos.

Ni ŝatas esti en alia renkontiĝo, se estos gejunuloj tiel.

Bella Strid kaj Hediye Güzel



*Supre:  
Bella Strid kaj  
Hediye Güzel.  
Dekstre:  
Malgranda  
akcepto por  
Rondo Langlet,  
kiu subtenas  
SEF-n per  
regulaj donacoj.  
Fotis: Olof  
Pettersson*



## ELEKTITAJ ESTRAROJ

Sveda Esperanto-Federacio  
Bengt Olof Åradsson, prezidanto  
Olof Pettersson, estrarano  
Ann-Louise Åkerlund, estrarano  
Dan Palm, estrarano  
Agneta Emmanuelsson, estrarano  
Siri Bartusch, anstataŭanto  
Roland Lindblom, anstataŭanto

Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo  
Robin Iversen Rønnlund, prez.  
Magnus Henoch  
JohanKrig Ölund  
Carl Mäsak  
Janko Luin  
Jessica Hanmeier  
Arild Mattsson


Eldona Societo Esperanto  
Leif Nordenstorm, prezidanto  
Joakim Enwall, sekretario  
Tomas Jansson, kasisto  
Andreas Nordström, anstataŭanto  
Per-Olov Johansson, anstataŭanto

Sveda sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj  
Agneta Emanuelsson,  
Bo Hedberg,  
Fredrik Olofsson,  
Inga Johansson,  
Sten Svenonius  
Ralf Jalming (anstataŭanto)  
Carl Mäsak (anstataŭanto)

Sveda Esperanto-Instituto  
Lars Forsman (rektoro), Karlskoga  
Birgitta Anevik, Lidköping  
Inga Johansson, Göteborg  
Ann-Louise Åkerlund, Helsingborg  
Folke Wedlin, Mölndal

Sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia  
Mats Landfors, prezidanto,  
Agneta Järnlström, sekretariino,  
Bengt-Olof Åradsson, kasisto  
Leif Nordenstorm, anstataŭanto.

## VIZAĜOJ Novelaro 2000-2009



### Ĝi ĵus aperis!

Sten Johansson: La Esperanta novelarto dum 120 jaroj  
Massimo Acciai: La urbo  
Ulrich Becker: La inico  
Mikaelo Bronŝtejn: Peco de kablo  
Jorge Camacho: Sep rakontetoj  
Luiza Carol: Ĉu vi scipovas ludi tomlandilon?  
Leen Deij: Tenu la amon brulanta!  
Vimala Devi: Dubo  
István Ertl: Ducent mejloj ĝis Talooska  
Ruben Feldman Gonzalez: Rememoroj pri dolĉa patrino  
Judit Felszeghy: Iam, ne dimanĉe  
Lina Gabrielli: La unua de aprilo  
Gbeglo Koffi: Rampo-lernejo  
Paul Gubbins: Cirkvita perturbo  
Sten Johansson: Pordo al la maro  
Lena Karpunina: Ordinara vizaĝo  
Miĥail Korotkov: Io devas okazi  
Mao Zifu: Unu monato  
Geraldo Mattos: Vivogumo  
István Nemere: Du mikronoveloj  
Leif Nordenstorm: Signoj dum ŝtormo  
Raita Pyhälä: Post unu vivo kune  
Christian Rivière: Go-ludo  
Sen Rodin: La ŝtelo-manao  
Giorgio Silfer: La violeta zontuko  
Trevor Steele: Feliĉan Kristnaskon  
Lenke Szász: Nekrologo  
Paulo Sérgio Viana: Geedza ringo  
Tim Westover: Rulkreskaĵo  
Etel Zavadlav: Ŝtelisto Hadit kaj lia frato  
Biografietoj

29 noveloj  
179 paĝoj  
200 svedaj kronoj  
plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto  
Esperantoförlaget  
Retadreso: eldona@telia.com  
Telefon: 070-5850054



SVEDA  
ESPERANTO  
INSTITUTO

Sveda Esperanto-Instituto invitas al

## Kursoj de Esperanto

sur la bela, tre alispeca insulo Visingsö en Vetter-Lago.

Kunlabore kun Braheskolan, la popola altlernejo de Visingsö, ni ofertas tri ŝtupojn:

- Ø I por komencantoj
- Ø II por daŭrigantoj
- Ø III por progresintoj

Tempo: 26 – 30 julio 2010 (ĉiuj ŝtupoj paralele)

Instruistoj: Lars Forsman; Folke Wedlin; Hokan kaj Sonja Lundberg Petroviĉ

Kosto por manĝo kaj loĝo ĉe Wisingsö Hotell & Konferens dum 5 tagoj: 3100 kr

Kurso senkosta.

Informoj: Lars Forsman: larsespo@yahoo.se

Aliĝoj: info@braheskolan.se

(Rim.! Plej malfrue 15-an de junio)

El la kurskatalogo de Braheskolan:

Esperanto

Kurstid: 26 - 30 juli 2010

Anmälän senast: 15 jun 2010

Pris: 3100 kr

Har Du lust att pröva på, så är Du välkommen till Visingsö i sommar. Även Du som redan har en grund i esperanto får möjlighet att bygga vidare på Dina kunskaper.

## Vikipediaj tagoj

en Gotenburgo por interesatoj de ĝenerala klereco:

ni kune kreos novajn esperantajn artikolojn de Vikipedio.

Tempo: 2 – 3 oktobro 2010, ekde la 11-a horo

Loko: la Urba Biblioteko de Gotenburgo ĉe Götaplatsen

Seminario senkosta.

Informoj kaj aliĝo: Inga Johansson: sat\_sverige@yahoo.se

Se eble, kunprenu propran tekokomputilon.

[www.esperantoinstitut.se](http://www.esperantoinstitut.se)



## Sommarkurs i Esperanto 13-21 juli 2010 i Lesjöfors.

Beställ information på [kurs.egarden@esperanto.se](mailto:kurs.egarden@esperanto.se) eller per post Esperanto-Gården 680 96 Lesjöfors.

Internationell kurs 13-21 juli 2010 på Esperanto-Gården i Lesjöfors

Undervisning i fyra nivåer

1. barngrupp
2. nybörjare
3. fortsättning
4. konversation

Ca 6 timmar undervisning per dag, med svenska och utländska lärare. Även i nybörjarkursen står det talade språket i centrum med direktmetod och erfarna lärare.

1. Ännu ej klart, 2. Carl Mäsak, 3 och 4. Tatiana Rudakova, Moskva och Gerhard Tobias, Polen/USA.

Årets nyheter!

Efter lunch kan du delta i ...

\* Esperantologi - en kurs med Roland Lindblom som lärare.

\* Översätt din dikt eller sångtext till esperanto! Handledare Martin Strid.

\* Esperanto i scoutvärlden - Lord Baden Powell ville att scouterna skulle använda esperanto.

Boende: enkel-, dubbel- eller flerbäddsrum, tält, husvagn/bil, hemma = dagelev.

Kontakta: Esperanto-Gården eller e-post:

[kurs.egarden@esperanto.se](mailto:kurs.egarden@esperanto.se)

så sänder vi kursprogram med priser och blankett för din anmälan till årets kurs.

## TRA LA MONDO

### Kursoj por 500 en Indonezio

Heidi Goes el Nederlando instruis Esperanton en Ĵakarta, la ĉefurbo de Indonezio, kaj en aliaj urboj en la lando, i.a. en lernejoj kaj universitatoj. Entute partoprenis preskaŭ 500 infanoj, studentoj kaj plenkreskuloj. Danke al subvencio de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado ŝi povis disdoni i.a. 100-ekzemplere la indonezian eldonon de la ŝlosilo kaj la koncizan bildgvidilon poŝamiko.

### Pasporta servo 2.0

Alvenis Pasporta Servo 2.0: la internacia gastiga servo per Esperanto, nun en Interreto!

La mondo ŝanĝiĝas kaj kun ĝi ankaŭ ni ĉiuj. Kiel multaj el vi scias, TEJO nuntempe okupiĝas pri kompleta modernigo de sia plej furora servo: Pasporta Servo. Al la tradicia libreto aldoniĝis retpaĝaro, kiu havos saman celon sed donos multajn pliajn eblecojn. Se vi ne konas Pasportan servon antaŭe, vi sciu ke ĝi ebligas al esperantistoj senkoste tranokti ĉe mil-kelk esperantistoj, kies nomoj kaj adresoj aperas en la listo.

[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org)

### Geedziĝu Esperante

En la Esperanto-urbo Herzberg en Germanio, nun eblas ankaŭ geedziĝi en Esperanto.

S-ro Gerhard Walter ricevis legitimilon kiel oficisto por civilstato. Tio signifas ke li rajtas, geedzigi parojn.

[www.esperanto-urbo.de](http://www.esperanto-urbo.de)

### El Kongolando

Nova, precipe virina grupo naskiĝis en DR Kongo, kun nomo Esperantista Grupo de Sankta Rita (EGSR). La 14-an de marto 2010 okazis inaŭguro de virina tago organizita de la grupo, kun granda etoso kaj almenaŭ cent partoprenantoj. Tio ĉi raportis RTVA, la eklezia radio.

Mia demando estas: Ĉu troviĝas esperantisto(j) en la ĉirkaŭaĵo de Karlskrona?

Ĉina amiko nia havas junan filinon, kiu supozeble studos en la Folkuniversitetet en Karlskrona ekde venonta aŭtuno. La knabino mem studis la anglan lingvon, sed la patro estas esperantisto el Hefe en la Anhui-provinco. Li volas kontaktiĝi kun esperantisto(j), prefere en suda Svedio. Mi pensas, ke li estas iom maltrankvila, ĉar tio estos la unuan fojon ke la knabino memstare faros vojaĝon al fremda lando. Ŝi estas 18-jara.

Birgitta Anevik  
Maratongatan 43  
53152 LIDKÖPING  
birgittaanevik\_cls  
@hotmail.com

# Esperanta Vikipedio

*Vikipedio estas interreta, plur-lingva enciklopedio kun enhavo laŭ la koncepto de libera scio.*

Ĝin verkadas volontuloj kunlabore – ĉiu homo kun aliro al la interreto rajtas ŝanĝi la enhavon de preskaŭ ĉiu artikolo. Tamen oni ne rajtas fari ion ajn, sed devas sekvi al certaj reguloj. La plej gravaj estas konformo al enciklopedieco, neŭtraleco kaj respekto.

La nomo Vikipedio estas esperantigo de la angla Wikipedia, kunfando de la havaja vorto *wiki* (signifas 'rapide') kaj la angla *encyclo(p)aedia* ('enciklopedio'). La vortero *paedia* venas tralatinne el la greka *paideia*, 'eduko', tiu siavice el *pais*, 'infano'.

## Historio

La anglalingva Vikipedio estis la unua Vikipedio. Fondite je la 15-a de januaro 2001, fare de Jimmy Wales kaj Larry Sanger, ĝi montras, ke la principo de libera scio ja estas aplikebla al reta enciklopedio.

Vikipedio ekzistas en pli ol 260 lingvo-versioj. En septembro 2007 ĉiuj diverslingvaj Vikipedioj entute havis pli ol 8 milionoj da artikoloj. Pli ol 2 milionoj el ili estis en la anglalingva versio, dum la esperanta enhavas nun 128 303 artikolojn. Tridek vikipedioj enhavis pli ol 50 000 artikolojn. Ekde sia fondiĝo Vikipedio daŭre pli populariĝis, kaj ĝia sukceso instigis fondon de pluraj frataj projektoj.

La Esperanta Vikipedio estis fondita je la 6-a de novembro 2001 de Chuck Smith. En decembro 2001, li laboris kun Jerry Muelver kaj Stefano Kalb por fari bazan vikipedion de 139 artikoloj. La Esperanto-Vikipedio publikigis je la 2-a de januaro 2002 kun pli ol 300 paĝoj. Ĝi ricevis la tutajn enhavojn de Enciklopedio Cigneta, Enciklo-

pedio Kalblanda kaj Monda Faktolibro. Ceteraj tekstdonacoj venas de la Enciklopedio de Esperanto, de Monato kaj pluraj libroj, kun konsento de la aŭtoroj.

La Esperanto-versio en 2006 havis 36,3 % de kontribuoj el Nederlando, 10,6 % el Ĉeĥio.

Esperantistoj ludas pli gravan rolon en diverslingvaj vikipedioj ol oni ĝenerale taksas. Unu de la ĉefaj teknikistoj de la tutmonda Vikipedio, Brion Vibber, estas esperantisto.

La slovakajn kaj svahilan versiojn de Vikipedio kreis esperantistoj (Viliam Búr kaj Marcos Cramer),

## Duboj kaj laŭdoj

Vikipedio estas estrata de senpartieco. Kritikistoj asertas, ke permeso redakti Vikipedion fare de kiu ajn farigas ĝin nefidinda. Vikipedio enhavas nenian oficialan dosieron, kiu okupiĝus per verkontrolado de faktoj kaj la redaktantoj mem ne ĉiam devas esti interkonatiĝintaj kun temo, pri kiu ili verkas. En interparolo kun The Guardian bibliotekisto Philip Bradley esprimis sin, ke "li ne uzus Vikipedion kaj ke li ne konas eĉ unu bibliotekiston, kiu uzas Vikipedion. Ĉefa problemoj estas manko de organoj. De eldonejo de presitaj publikajoj eblas atendi garantian, ke iliaj informoj estas fidindaj, ĉar de tio dependas ilia vivtenado. Diference de io tia (Vikipedio), kio bildiĝas sur ekrano."

Vikipedio estis kulpigita pro manko de kapableco kompreni al vasta spektro de temoj. La kaŭzo estas propravola karaktero de la projekto kaj la tuta interesiĝo de ties kontribuantoj. Dale Hoiberg, ĉefredaktoro de Encyclopaedia Britannica, asertas: "oni skribas pri aferoj, kiuj interesas onin, do multe da temoj restos ne ensumigitaj.

Kontribuo pri hurikano Francis estas kvinoble pli longa ol artikolo pri ĉina arto kaj kontribuo pri Coronation Street estas duoble tiel longa ol artikolo pri Tony Blair."

En alia flanko Vikipedio estis laŭdita por tio, ke ĝi ebligas aktualigon de artikoloj aŭ novaj artikoloj estas kreitaj kiel reago je certa evento. Ekzemple tiam aktuala artikolo pri tertremo en Hinda oceano el la jaro 2004 en la angla versio de Vikipedio estis ofte citita fare de ĵurnalistoj post la tertremo. Redaktoroj de sciigrimedoj ankaŭ asertas, ke enciklopedio kiel Vikipedio havas multoblajn eblecojn ampleksi pli da temoj, kiel povas ampleksi presitaj formoj de enciklopedioj.

Plie, estus menciinde, ke la ekzemploj de Hoiberg baldaŭ post tiu kritiko ne validis: La artikoloj pri la ĉina arto kaj pri Tony Blair baldaŭ plilongiĝis. Tiuj ĉi estas nur ekzemploj de ekinteresinta raportado, sed same ili povas montri tion, kiel Vikipedio proksimiĝas al prudenta egaleco.

## Komunumo

Vikipedio havas komunumon de uzantoj, da kiuj estas proporcie malmulte, sed ili estas tre aktivaj. Emigh kaj Herring asertas: "Kelke da aktivaj uzantoj prezentantaj komune kun donitaj reguloj kaj sistemo de libera reguligo povas atingi grandan kontrolon super enhavo produktita en la sistemo, laŭvorte forviŝante variecon, polemikon, malkonsistecon harmoniante opiniojn de la kontribuantoj."

Kelkaj kontribuantoj plendas, ke reguligado de Vikipedio estas tre laciga okaze de konfliktoj. Same ili plendas pri fakto, ke Vikipedio grandmezure preferas kontribuantojn, kiuj havas karakterizajn opiniojn.

Sed en la alia flanko Vikipedio estas, kiel asertas ties redaktantoj, tre valora kiel socia komunumo.

Laŭ informoj en Vikipedio

## LINGVO

### Traduk-helpilo de Google ankaŭ en Esperanto

La aŭtomata tradukilo de Google ankoraŭ ne konas Esperanton, sed la unua paŝo en tiu direkto estas farita. Ekde kelkaj semajnoj la traduk-ilaro de Google estas uzbla ankaŭ por tradukoj al kaj el Esperanto, aldone al preskaŭ 350 aliaj lingvoj. Temas pri retejo, kiun tradukistoj kaj tradukantoj povas uzi por sistemigi kaj faciligi sian laboron. Diference de iuj ekzistantaj projektoj de aŭtomata tradukado, la tradukilo de Google ĉefe baziĝas sur statistika analizo de la tekstoj. Tial, se la nova servo estos amplekse uzata, tekstaroj tradukitaj helpe de ĝi povus ankaŭ helpi la evoluigon de aŭtomata tradukado el kaj al Esperanto. Ulrich Becker esploris la traduk-ilaron, kaj klarigas por kio ĝi utilas.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)



## ESPERANTO-HISTORIO

### Amasa partopreno en Ĉe-kursoj

Esperantosocieto de Sundsvall "Amika rondo" dum sia jar-kunveno studis historieton, verkitan por la 50-jara jubileo de la klubo en 1979. Ni legis i.a. pri la alveno de la rumano Tiberio Morariu en 1928. Li instruis laŭ la t.n. Ĉe-metodo. Al la kursoj aliĝis tiom da homoj, ke oni devis duobligi la kursojn. Post tiuj kursoj oni fondis la klubon, kiu tiam havis kvardeko da membroj. Jam en septembro 1929 oni invitis Elinjon Pähn el Estonio por nova komencantula kurso, sed oni devis atendi ĝi 1931 por ke ŝi fakte alvenu.

Anna kaj Mats Landfors

## VORTOJ DE LA ESTRARO

### Storsamling för esperantorörelsen i Sverige hösten 2010

Det har många gånger de senaste åren framförts önskemål om att vi borde ha en liknande samling om esperantorörelsen i Sverige, som storsamlingen i Jönköping för ett antal år sedan. Vid kongressen i Borlänge 2009 påbörjades ett samtal om esperantorörelsen som fortsatte i Lesjöfors i år. Det bestämdes då att vi skulle anordna ett möte till hösten 2010. Svenska Esperanto-Förbundet har tagit på sig att anordna detta möte och preliminärt är datum bestämt till 9-10 oktober. Plats är ännu inte bestämt, men det finns tre förslag: Malmö/Helsingborg, Norrköping eller i Skövde-trakten. I nästa nummer av La Espero ska vi kunna presentera fler detaljer. Till detta möte är givetvis alla esperantister välkomna, organiserade likväl som oorganiserade. Jag vill dessutom uppmana alla och speciellt representanter för nuvarande organisationer att ta tillfället i akt att i kommande nummer av La Espero framföra sina idéer och argument.

Bengt Olof Åradsson  
ordförande SEF

## NEKROLOGO

### Kurt Frisk 1919-2010

Kurt Frisk, multjara vicprezidanto en la Skövde-klubo, mortis. Kune kun sia edzino Hilgon Kurt estis dum multaj jaroj gvidanta forto en la Skövde-klubo. Kurt estis lerta kunven-prezidanto kaj ankaŭ tiun ĉi printempon li gvidis la jarkunvenon spite al sia alta aĝo, 90 jaroj.

Jam kiel knabo en Skövde li lernis esperanton. Kiel reklam-desegnisto li poste loĝis multloke en la lando, ĉiam praktikante esperanton kaj partoprenante klubajn vivojn, interalie en Örebro kaj Västerås. Kiel reklam-desegnisto li estis konata kiel kreinto de la ICA-simbolo "ICAnde".

Carl-Erik Ohlsson

## NEKROLOGO

### Aira Kankkunen 1928-2010



Aira Kankkunen naskiĝis en Finnlando. Ŝi laboris kiel diakonino inter surdaj kaj blindaj infanoj. Pli poste ŝi komencis labori pri aŭddiagnozoj por infanoj kaj plenkreskuloj. Por lerni pli multe pri tiu fako ŝi eklaboris en la malsanulejo Sahlgrenska en Gotenburgo. Post ŝia iom pli frua pensiĝo en 1988, ŝi komencis lerni Esperanton. Ŝi ekverkis poemojn kaj novelojn en la lingvo kaj gajnis la titolon "Nova talento" en Belartaj konkursoj de UEA 1992. Ŝi eldonis 13 librojn en Esperanto, i.a. tradukon de sia libro pri infana aŭdiologio.

Ŝi verkis lernolibron pri infana aŭdiologio, kaj estis la unua flegistino kiu doktoriĝis ĉe la medicina fakultato de la Universitato de Gotenburgo.

Ŝi daŭre esploris kaj ekhavis docentan postenon en 1984.

Dum multaj jaroj ŝi gvidis verkokurson en la Esperanto-societo de Gotenburgo, en kiu la partoprenantoj ekzercis esprimi sin en poemoj kaj noveloj en Esperanto. Tiujn verkojn oni kolektis en kajerojn.

Aira estis kuraĝa kaj serioza persono, sed ŝi havis ankaŭ ĝojan kaj junecan flankon. Ŝi estis aktiva ĝis la fino.

Ŝiaj amikoj, la esperantistoj en Gotenburgo kaj en aliaj lokoj en Svedio kaj ekster la landoj, ĉiam memoros ŝin danke.

Andreas Nordström  
Göteborgs Esperantoförening

## Oratoraĵoj

*Lapenna, Ivo. Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Rotterdam 2009. 166 p.*

Tiom longe kiom ekzistos esperanto verŝajne la paroladoj de Lapenna estos konsiderataj klasikaj de oratora arto. Liaj prelegoj kaj paroladoj estas zorge kaj profesie konstruitaj kaj ĉiam valoros studadon de homoj, inter kies taskoj estas publike oratori.

La ĉefa parto de ĉi tiu kolekto estas 17 inaŭguraj paroladoj, kiuj bone spegulas la planojn kaj ambiciojn, kiujn Lapenna havis por esperanto. La restantaj 5 estas prelegoj enklude de 2 nove aldonitaj. La du plej ampleksaj estas "La lingva problemo en la internaciaj rilatoj" kaj "Universala Esperanto-Asocio". Almenaŭ tri el la paroladoj estas sondiske akireblaj, kaj por serioza studanto tio povas esti tre utila, ĉar ankaŭ la voĉa prezento estis por Lapenna kaj lia publiko tre grava.

Nur unu kritika rimarko: tute mankas eĉ eta klopodo per komentario loki ĉi tiun novan eldonon en ĝustan mond-historian kaj movadhistorian kuntekston (la unua eldono aperis en 1966). Sed bonŝance eblas al interesata leganto kompensi la mankon legante "Esoj memore al Ivo Lapenna" de Carlo Minnaja.

Sed post la lego de ĉi tiu eldono restas persistanta demando: kial ĝi estas eldonita sen ajna komentario klopodanta enkadrigi la verkon en ĝiajn historiajn cirkonstancojn, ĉu kiel mokon pri la karismo de la iama malamiko, kiun la eldonanta organizo vere ne traktis afable dum liaj lastaj vivojaroj, aŭ ĉu male kiel savoveŝton por lia iama strategio, nun en kelkaj rondoj pridubata. Aŭ ĉu, plej verŝajne, la eldona sekcio de UEA, intence aŭ ne, neglektas, ke tia eldono havas ankaŭ movadpolitikan signifon.

Bertil Nilsson

## La kvar rabenoj

Judoj kutimas priskribi sin kiel diskutema popolo. Proverbo diras: "Kie estas du judoj, tie estas tri opinioj." En la juda tradicio ekzistas Talmudo, en kiu saĝuloj donas tre malsamajn komentojn al bibliaj tekstoj. Tute kontraŭdiraj komentoj jam antaŭ pli ol jarmilo estis publikigitaj en la sama libro. Laŭ judismo ĉiu ja rajtas interpreti biblion en sia maniero. Tre frua tradicio pri esprimrajto (*ytttrandefrihet*).

Ekzistas juda anekdoto, kiu ŝerce priskribas tiun esprimrajton:

Tri junaj rabenoj estis gastoj ĉe maljuna rabeno, kie ĉiuj kune diskutis la interpreton de teksto en la biblio. Unu juna rabeno esprimis sian interpreton. La maljuna kapjesis dirante: "Vi tute pravas."

Post iam da silento la dua juna rabeno esprimis tute kontraŭan interpreton de la sama teksto. La maljuna rabeno denove kapjesis dirante: "Ankaŭ vi pravas."

Aŭdinte tion la tria juna rabeno koleriĝis. Li diris al la maljuna kolego: "Kiel tio eblas? Unue vi diris al tiu mia amiko ke lia interpreto pravas. La alia ulo interpretis la tekston tute alimaniere, sed vi diris ankaŭ al li ke ankaŭ lia interpreto pravas. Tiel ne povas esti. Nur unu el la interpretoj povas esti la ĝusta."

La maljuna rabeno rigardis la junan kolegon kaj trankvile respondis: "Fakte, ankaŭ vi tute pravas."

## Rakontetoj pri Nasreddin

Nasreddin vivis antaŭ 700 jaroj en Turkio. Oni preskaŭ certas ke li vere ekzistis. En multaj landoj oni rakontas anekdotojn pri li:



### Nasreddin kaj la elefanto

Iun tagon Nasreddin vizitis riĉan amikon kaj diris al li:

"Donu al mi iom da mono":

Riĉa amiko: "Kial?"

Nasreddin: "Nu! Mi volas aĉeti elefanton."

Riĉa amiko: Se vi ne havas monon, kiel vi povos doni manĝon al la elefanto.

Nasreddin: "Mi venis tien ĉi por havigi monon, ne por aŭdi viajn stultajn konsilojn."

### Nasreddin kaj la azeno

Sur foiro en Buĥara Nasreddin sidas inverse sur la dorso de azeno.

Iu: "Kial vi sidas inverse sur la azeno?"

Nasreddin: "Ne mi sidas inverse. La azeno staras inverse."

### Sama gusto

Kelkaj infanoj vidis Nasreddin venanta el vinbera ĝardeno kun du korboj plenaj da vinberoj, ŝarĝitaj sur lia azeno. La infanoj petis de Nasreddin kelkajn vinberojn por gustumi. Nasreddin prenis kelkajn kaj donis unu beron al ĉiu infano.

"Vi havas tiom da beroj kaj vi tamen donis al ni tiel malmulte," la infanoj plendis.

"Mi povas doni al vi po unu aŭ tutan korbon. Ne estas diferenco. Ĉiuj gustas same."

Tiel Nasreddin respondis kaj daurigis sian vojon.